

Laŭokaza novaĵletero

de la komerca fakgrupo.

Numero 3;

decembro, 1984.

*Respondeculo: S-ro Lorenc' Mi,
P.O. Kesto 25041,
3001 HA Rotterdam, Nederlando.*

IRAN-ESPERANTO RAPORTAS pri

Laŭdinda kaj imitinda kampanjo.

Regule en Tehrano, la ĉefurbo de Irano, oni okazigas Internaciajn Industriajn Ekspoziciojn, al kiuj venas por prezenti varojn de siaj entreprenoj reprezentantojn el multaj landoj. La ekspoziciataĵoj estas tre diversaj, la produktaĵoj de pezaj kaj malpezaj industrioj de la plej konataj industriaj landoj. La daŭro de ĉiu ekspozicio estas du aŭ pli da semajnoj, kaj granda amaso da homoj, ekspozicianoj kaj spektantoj, faras propran impreson sur la vivon de Tehrano.

La adeptoj de la internacia lingvo en Tehrano konceptis la ideon provi ekspluati la ĉeeston de tiom da homoj el tiel diversaj lingvo-regionoj, por propagandi peranton. Jam antaŭ la ekjarigo de la ekspozicio en 1982, laborgrupo de entuziasmaj Iran-Esperanto-anoj, (IE-anoj), entuziasme diskutis la eblecojn cele al adopto de konkreta laborplano. Jam tiam estis konate, ke en la ekspozicio partoprenos firmaojn aŭ agentojn el 22 landoj de Eŭropo, Azio kaj Aŭstralio, kaj ke la laborgrupo disponos pri 32 diversaj kaj diversprofesiaj Esperantistoj.

La laborgrupo zorgis pri kolektado de adekvata kvanto da informmaterialo de plej diversaj specoj. Inter tiuj, troviĝis, krom la Jarlibro kaj Katalogo de

UEA, provekzempleroj el la Esperanto-gazetaro, turismaj broŝuroj kaj afiŝoj, propagandiloj de aŭtomobil- kaj aviadil-entreprenoj, kaj aliaj informiloj kiel fotokopioj de 'Esperanto en Radio' kaj aliaj anoncoj. La anoj de la laborgrupo preparis arĝon de diversaj demandesprimoj, cele al evito de monotona ripetado dum vizitoj al la budojn en la ekspozicio. Jam antaŭ la komenciĝo, la IE-anoj sentis sin relative bone ekipitaj kaj Esperante dokumentitaj.

La ĉefa ero de la laborplano estis aŭdace simpla: la IE-anoj, jen unuope, jen kelkope, vizitas la budojn kaj petas de la tieaj deĵorantaj komizoj broŝurojn en la lingvo Esperanto!

Dum dek du tagoj, ekde la malferma tago, la IE-anoj sukcesis efektiviĝi pli ol sesdek interhomajn renkontojn, el kiuj nur unu spertis vere negativan reagon.

Neniu ekspoziciano disponis pri kiu ajn Esperanta broŝuro!

Ne surprizita per tio, la IE-anoj ekspluatis ĉiun eblan okazon starigi demandojn pri kono de kaj pri Esperanto, kaj petis opiniojn. Rimarkinte fojan ioman pozitivan sintenon, la IE-anoj daŭrigis vigle informi la deĵoranton pri la disvastigo de E-o en Irano, en multaj aliaj partoj de

la mondo kaj precipe en la propra lando de la ekspoziciano. Tiu lasta ofte kaŭzis surprizon, sed tamen interesigon.

Tiuj IE-anoj, kiuj partoprenis la kampanjon, raportis, ke ĝenerale kaj mallonge, la reagoj estis iu rara miksaĵo de miro, surprizo, bonvenemo, scivolemo, entuziasmo kaj, laste sed ne malplej grave, vera kompreno.

Kvankam ja ne ĉiu deĵoranto esprimis sin favore al E-o, tamen rimarkinde estas, ke tre malmultaj opiniis, (3 el 62 personoj), ke Esperanto ŝajnas sensukcesa iniciato aŭ ne realigebla, optimisma idealo. Unu rekte negativa reago estis, ke "Esperanto ne estas komerca lingvo." !

Plejparte, la reagoj, kvankam milde esprimitaj, kontentigis la IE-anojn pensi, ke tiuj ĉiutagaj kontaktoj kun diverslandaj ekspozicianoj vekis plikaj pli ĝeneralan atenton favore al Esperanto.

Tre agrablaj surprizoj estis por IE-anoj renkontigi kun kelkaj iamaj Esperantistoj, inter la personaro de la ekspozicio. Por tiuj, la renkonto ŝajne estis agrabla instigo reveni al nia flanko serioze. Almenaŭ unu deĵoranto ricevis tiel bonan impreson, ke li faris libervolan promeson eklerni la lingvon post hejmenveno en la propra lando.

Por la IE-anoj, la sperto estis senescepte agrable neforges-ebla. Ili ricevis stimulaĵojn interhomajn kontaktojn, kaj dume akiris memfidon kaj kuraĝon refoje kontraŭbatali antaŭjuĝojn, instigi intereson kaj eĉ atingi veran internacian komprenon.

Tiel kuraĝigita, la Iran-Esperanto Laborgrupo ripetis la agadon en la posta jaro, (1933), kun eĉ pli multnombraj pozitivaj reagoj, kaj kun kelkaj renkontiĝoj vere kortuŝaj pro la granda intereso. Dum tiu dua sperto, la IE-anoj eĉ pli libere povis enigi en mildajn konversaciojn pri la lingvo-problemo,

disdonante pli da bazaj informoj pri la i.l., kaj pri la mondskala organizaĵo, kiu estas la E.-Movado. Sendube, la memfido akirita dum la unua provo efikis kiel granda subtenilo kaj kontribuis multon al la sento, ke la rikolto estis pli sentebla eĉ ol en la antaŭa provo.

La raporto de tiu dua provo emfazas la konsilindecon, ne nur transdoni informilojn sed pruvi, per trafaj vortoj kaj klarigoj, ke Esperanto estas efektive vivanta lingvo, praktike uzata kaj uzebla en la ĉiutaga vivo ankaŭ en la kampoj de komerco kaj industrio.

La IE-anaro konvinkigis, ke la rezultoj tute pravigis la elverŝon de energio kaj mono, kaj konsilas al samideanoj en aliaj landoj preni la kuraĝon simile starigi kampanjojn dum similaj ekspozicioj.

Oni konstatas, ke pli-malpli la samaj deĵorantoj reprezentas la entreprenon en tiaj ekspozicioj, senkonsidere de la lando en kiu okazas la ekspozicio. Se Esperantistoj amase sin prezentus en multaj internaciaj ekspozicioj, aŭdace petantaj informilojn en la i.l., sufiĉe baldaŭ la mesaĝo atingus la ĉefsidejojn de tiuj entreprenoj, ke la i.l. ja estas valora ilo por komercaj celoj.

La IE-anoj volas emfazi la neprecon de zorga preparado por tia agado, ne malplej grave en la afero de ekzercado en la 'arto' alparoli nekonatajn deĵorantojn cele al montrado de informmaterialo. Ne necesas aldoni, ke iu provo imiti nian kampanjon ricevus ne nur moralan sed ankaŭ praktikan subtenon en la formo de konsiloj el propraj spertoj, flanke de la geamikoj en Tehrano.

Kopioj de la koncernaj raporto estas libere haveblaj, sekve de klara peto kun respondkuponoj por la afranko.

Ŝirin Ahmad-Nia.

(adapatita
de lm)

INTERKONATIĜO

Ĉi-foje ni prezentas liston de niaj membroj, kaj ni nun transiras al la normala sistemo ekspedi la Novaĵleteron nur al niaj membroj, (krom al la ĉefaj instancoj de la Esperanto-Gazetaro, informcele).

En la listo, la cifero je la komencigo de la linio indikas la ordon de ricevo de la kotizpago.

Ni petas atentigon pri iuj eraroj de detaloj en la listo.

Membro-listo, je 1984-12-15.

1. Sartorio, S-ro Giancarlo, merkatesplora konsilisto;
via Biga 1/12, I-16144 Genova, Italio;
2. Mee, S-ro Lawrence, administranto;
van Heusdestr. 88 A, 3023 RX Rotterdam, Nederlando;
3. Rotsaert, S-ro Roland, bankoficisto;
Visspaanstraat 97, B-8000 Brugge, Belgio;
4. Braun, S-ro Franz J., fakdirektoro;
Hornisgrindestrasse 8, D-7580 Bühl 16, Okc. Germanio;
5. Hagemann, S-ro Per, komerca ekonomiisto;
Horserødsvej 18, DK-2100 København Ø, Danlando;
6. Rapley, S-ro John C., kontotenisto;
Rochussenstraat 133 C, 3015 EJ Rotterdam, Nederlando;
7. Gether, D-ro István, ekonomiisto;
Berényi u. 8 I 6, H-1016 Budapest, Hungario;
8. Instituto Dex, S.A., entrepreno kaj laboratorio veterinara;
Ap. 7.009, 41007 Sevilla, Hispanio;
9. Luin, S-rino Ulla, ekonomiisto;
Myggdalsvägen 123, S-135 42 Tyresö, Svedio;
10. Ortegón, S-ro Mario J., instruisto pri matematiko;
Calle 14 +1-23, Bogotá, Kolombio;
11. Lee, S-ro Teck Shiu, direktoro de entrepreno;
P.O. Kesto 11992, Hong Kong, Hongkongo;
12. Polerani, D-ro Gianfranco, revizoro kaj konsilisto;
Viale G. Suzzani 2, I-20162 Milano, Italio;
13. Schneider, S-ro Franz, emerita financoficisto;
Am Gallenberg 18, D-5960 Olpe, Okc. Germanio;
14. Gilbert, S-ro François-Xavier, direktoro de komerca ĉambro;
Vert Coteau, Longeville-en-B., F-55000 Bar-le-Duc, Francio;
15. Mondkomerca Eldonejo Esperantisto, entrepreno;
P.O. Kesto 25041, 3001 HA Rotterdam, Nederlando;
16. Ahmad-Nia, F-lino Širin, studento;
Kh. Zafar, Kh. Kholand, Kh. Dolatshad,
K. Iraj 33, Teheran, 19-166, Irano.

Niaj mecenatoj.

Ni esprimas apartajn dankojn al membroj, kiuj faris kroman pagon, aŭ por donaci al la ĝenerala kaso aŭ por kontribui al la asocia kapitalo. Dankon! al :

S-roj Sartorio, Mee, Braun, Hagemann, Rapley kaj Gether;
S-rino Luin; S-roj Ortegón, Lee, Polerani kaj Schneider.

Administrado kaj financoj.

Nia Fakgrupo faris gravan antaŭan paŝon, lastatempe, kiam ni mendis kunvensalonon por dum la Universala Kongreso en Aŭgsburgo, Okc. Germanio, de la 3-a ĝis la 10-a de aŭgusto, proksimjare.

Prenante en konsideron la ideon, kienia agado havas ĝeneralan intereson por la E.-Movado, UEA disponigas tiun ĉambron senpage al ni.

Per tio ĉi, do, ni donas antaŭan averton, ke la formala fondkunveno de nia Fakgrupo okazos iam dum la kongreso. (La detaloj pri kunveno-horo kaj -loko estas ankoraŭ nekonataj.) Ni urĝe konsilas al vi, aliĝu jam nun al la Kongreso, kaj varbu novajn membrojn, porke nia fondkunveno estu impone ĉeestata.

La ĉefaj eroj sur la tagordo por la fondkunveno estos, kompreneble, adopto de Statuto, elekto de Estraro kaj diskuto pri la laborplano por la Fakgrupo.

Ni esperas kunmeti ĝustatempe por la proksima Novajletero malneton de Statuto, por doni adekvatan tempon por interŝanĝado de ideoj pri ĝi, antaŭ ol prezenti ĝin en pli-malpli konkreta formo, al la fondkunveno. Se iuj el vi havas jam konsilojn por ni pri nepraj paragrafoj por la Statuto, bonvolu ilin sciigi al ni.

Diskuto pri la estonta nomo de la Fakgrupo daŭris perletere lastatempe. Ankoraŭ ne estas klara interkonsento pri la plej bona vortumado, sed ŝajne neniu membro tenas fortan sintenon kontraŭ iu ĝisnuna propono. El la leteroj ricevitaj, tamen, ŝajnas evidente, ke la membroj preferus mallongan nomon, kiu tamen aludas al la du kampoj de nia intereso, tio estas, al komerco kaj ekonomio. Sekve, la plej freŝa propono estas: Internacia Komerca kaj Ekonomika Fakgrupo, I.K.E.F.. Kion vi opinias?

Nia membrolisto havas nun dek ses nomojn el dek du landoj, sed

nia financa stato estas ankoraŭ tre malforta. Tutevidente jam, la jarfina kalkulo montros deficiton egalan al dek gultenoj por ĉiu membro, aŭ pli ol tio. La ĉefa kaŭzo por tiu malbona rezulto estas nia elspezo de afranko kaj ligitaj kostoj sendi Novajleterojn al ĉiuj reagantoj, el kiuj, tamen, nur unu el ĉiu tri membriĝis.

Vere urĝa bezono nun estas akiri plidamembrojn, se entute ni Fakgrupo volas meriti atenton ne nur de la ekstera komerca kaj ekonomia mondo, sed ankaŭ inter Esperantistoj. Unu facila ago estas farebla de ĉiuj el vi! Verku leteron pri la Fakgrupo al la redaktoro de la bulteno de via landa asocio, kaj en tiu letero proponu vin mem kiel peranton por aliaj membroj en via lando. Se -- ne kredeble! -- vine havas talenton verki tian leteron, sendu al ni tri respondkuponojn kaj la adreson de la koncerna redaktoro, kaj ni plenumos la taskon por vi. Memoru nian laborplanon! Ĝi ne estas plenumebla per unu aŭ du aktivuloj!

Ni ĉiuj konstatas, ke antaŭ ni estas giganta tasko; ni bezonas dediĉitan laboron de multaj aktivuloj por atingi eĉ malgrandan parton de nia tasko!

Jam estas ne tro frue memorigi kelkajn el vi pri la kotizo por la proksima jaro; ju pli frue vi faros la pagon, des pli forte vi kuragiĝas nin porti la ŝarĝon kaj daŭrigi la laboron. Al ĉiuj el vi ni adresas peton pensi pri kelkaj kandidatoj por membreco, kiuj, ĉar ili loĝas en lando kun problemoj transpagi valuton eksterlanden, ne povas vere aliĝi al nia Fakgrupo. Vi povas demonstri vian senton de solidareco per donaco al nia kaso, kun indiko: por la subtena fondaĵo.

Se via pago sufiĉas, vi rajtas elekti la landon de via kandidato el: Sri-Lanko, Bolivio, Kamerunio, Jugoslavio, Ekvadoro, Pollando, Venezuelo, Brazilo,

Ĉinio aŭ Hungario. Anticipan dankon!

Ankaŭ memorinda estas nia bezono por asocia kapitalo. Jam estas evidente, ke la ĝisnuna kapitalo ne sufiĉas por kovri la deficiton de la baldaŭ finiĝonta jaro. Tio signifas, ke Mondkomerca Eldonejo Esperantista devas porti la ŝargon ankoraŭ. Sed ĝi ankaŭ signifas, ke ne eblas starigi novan kampanjon anonci nian ekziston per reklamanoncoj aŭ simile, kaj sen tia agado ni ĉiujne ne povos plivastigi nian ombaron, nek entrepreni eĉ la plej malmultekostan agadon el nia agadplano.

Ni spertis imitindan enspezon lastatempe. Leginte nian aludon pasintfoje al la ebleco akiri la libron, La Nobla Korano, membro nia tuj faris pagon al nia poŝtĉekkonto en la ĝusta sumo. Ni 'mendis' la libron de nia membro en Irano, kiu tuj ekspedis la libron rekte al la mendinto. Por la kaso, la rezulto estas modesta gajno, sed tamen post pago de kotizo por nia membro en Irano por du jaroj. Dankojn al ambaŭ partioj!

Alia donaco venis en la formo de libro por nia biblioteko, sed ĝi estas libro kun diferenco!

S-ro Schneider sendis en la formo de fotokopio la tutan libron: Komerca Vortaro en Esperanto, de Robert Kreuz kaj kunlaborantoj, eldonita en 1927 en Italio, kaj enhavantan pli ol 1400 terminoj. Kvankam kelkaj el tiuj terminoj intertempe arkaikiĝis, la tuto meritas ankoraŭ multajn laŭdojn, ne malpleje pro la klaraj difinoj kaj la bonega prezentmaniero. Ĉiu termino havas rekonciferon, kaj la enkondukaj notoj aludas al apartaj listoj de nacilingvaj tradukoj, ĉiuj kun la koncerna rekoncifero. Nia biblioteko grande pliriĉiĝis per la akiro!

Kun ĝojo ni raportas la enoficiigon de tria funkciulo.

D-ro Gianfranco Polerani akceptis la taskon revizori niajn financajn traktaĵojn, tamen kun propono, ke alia membro, loĝanta pli apude al Roterdamo, estus pli taŭga elekto.

Aliaj sinproponoj por funkcioj estas bezonataj! La unua renkontiĝo de la funkciantoj verŝajne okazos je vendredo, la 18-a de aprilo, ĵus antaŭ la komenciĝo de la Markola Kongreso en Brugge, Belgio. Ĉiuj membroj estos bonvenaj!

lm

Ĉu oni rajtas senkoste uzi Esperanton?

Pensoj pri diskutinda temo, de Lorenc' Mi.

Ni ĉiuj foje asertas, ke Esperanto staras preta por uzado fare de iu ajn persono aŭ instanco, sen ia neceso fari pagon al aŭ sin klini antaŭ iu supera instanco. Bazita sur la deklaroj, jam ekde 1887, de la iniciatinto de la lingvo, D-ro L.L. Zamenhof, ni tute pravas en tiu nia aserto.

Sed ĉu la sama principo aplikiĝas, se entrepreno aŭ individua persono uzas la lingvon, kaj per tiu uzado spertas materian profiton?

Ĉu ne estus nur juste, se parto de tiu profito revenus al la Movado en iu formo? Se la respondo estas jese, la sekvaj demandoj devas temi pri la formo kaj grandeco de tiaj pagoj, sed unue necesas diskuti la bazan premison.

Kiel ekzemplo ni pensu pri tio ĉi, ke aktuale en Nederlando, du apartaj instancoj esploras la eblecojn uzi Esperanto-n kiel

bazon por aŭtomata tradukado de tekstoj, uzante komputoron.

Unu el la du estas kvazaŭ publika esplorinstanco, kiu ĝuas

subvenciojn el ŝtataj kaj aliaj komunumaj kasoĵ. La esploroj baziĝas sur la ebleco, ke Esperanto estu ponto, kiu ebligu tradukadon el unu lingvo en alian, (kaj, kompreneble, en aliajn, ĉar la baza teksto validas por multaj sinsekvaj tradukoj. Malfeliĉe por nia Movado, la esploristoj relative frue venis al konkludo, ke Esperanto mem ne absolute taŭgas por la bezonoj; ŝanĝoj estas necesaj por eviti ambiguajn formojn. Tiuj esploristoj kreis bazan 'interlingvon', kaj jam demonstiris la bazajn eblecojn.

Laboro daŭras por pliampleksiĝi la bazan interlingvon, kaj evidente la sistemo havas estontecon.

Ankaŭ evidente estas, ke la sistemo, kiam funkcianta, tre malmulte dependos je la organizite E.-Movado; la nura cerbo kiu okupiĝos pri la lingvo estas tio de la komputoro mem. Nekonate ankoraŭ, tamen, estas la rimedo aplikota, se la sistemo renkontiĝos kun vorto nekonata al si.

La dua esplorinstanco estas pli facile rekonebla kiel entrepreno, ĉar en ĝi laboras kvalifikitaj inĝenieroj kiuj agas kiel konsultistoj por klientkompanioj. El la honorarioj pagataj kontraŭ la servoj liveritaj, la esplorinstanco kovras siajn kostojn kaj spertas finanĝan gajnon.

Tiu entrepreno, do, nun estas konsiderindan sumon de mono kunmetado de komputora programaro, kiu ebligos aŭtomatan tradukon el Esperanto en la anglan aŭ alian (elekteblan) lingvon. Kiam plene funkcianta, oni proponos al klientoj tradukservon el unu nacia lingvo en alian aŭ en aliajn naciajn lingvojn. La baza traduko en Esperanton estos farita, kun helpo de komputoro, per laboranto-Esperantisto, kies gepatra lingvo estas tio de la proponata teksto. La posta traduko el E-o en la koncernan nacia lingvon aŭtomate faros la komputoro.

Baze al tiu ĉi dua propono estas la koncepto, ke la kvalito de la teksto en Esperanto devas esti altnivela kaj en senriproĉe

bona internacia stilo. La entrepreno estas jam konvinkita, ke la tempo bezonata por tradukado de teknikaj tekstoj estos draste malpli ol per la ĝisnunaj metodoj, kun pli fidindaj rezultoj. Kiel kromaĵo, la internacilingva teksto restos konsultebla aŭ eĉ amendebla.

Estas evidente, ke tiu dua esplorkampo ja ĉiam havos intimajn ligojn kun la organizita Movado, parte pro la bezono daŭre trejni novajn laborantojn en la aparta arto kompili kaj poluri la tekstojn en Esperanto, sed ankaŭ pro la neceso konstante ĝisdatigi la storitan provizon de vortoj kaj esprimoj, por ebligi tradukon de la plej aktualaj nocioj.

Sendube la organizita Movado estos preta liveri la bezonatajn servojn, kaj la entrepreno estos preta pagi la kostojn de tiuj servoj.

La dua pripensinda ekzemplo estas pli intime ligita kun nia Fakgrupo. Se kaj kiam ni sukcesos starigi vere funkciantan reton de komercaj rilatoj, kaj rektajn vojojn interŝanĝi ekonomiajn informojn, atendebla sekvo estos la foja subskribo de kontrakto bazita sur aŭ ebligita per tiuj rilatoj aŭ informoj. Laŭ difino, plenumo de kontrakto ebligas materialan gajnon al ambaŭ partioj; ĉu decas pensi jam, ke parto de tia gajno estas ŝuldata al nia Fakgrupo, kaj pere de ni al la organizita Movado?

Nia membro en Hongkongo, S-ro Lee, jam antaŭlonge kaj libervole proponis la transpagon al nia Fakgrupo de modesta frakcio de iu komisipago spertita de lia kompanio sekve de negocoj rekte ebligataj per la ekzisto de nia Fakgrupo. Tiu ŝajne estas imitinda sinteno.

Sed tamen eĉ nia Fakgrupo devas rekoni ŝuldojn al la organizita Movado. Tute normale, ni jam proponis, ke la Fakgrupo petu aliĝon al UEA por esti rekonita inter la kunlaborantaj fakaj asocioj, kaj tiam ni pagos modestan kotizon. Povas esti,

ke simila aranĝo eblus por simile aliĝi al SAT, kaj simile pagu kotizon. Ĉar nia Fakgrupo havas ne-ordinaran dependecon je novaj vortoj kaj esprimoj, oni povus argumenti, ke ni devas finance subteni la Akademion de Esperanto, kaj finance kaj energie subteni la Terminologian Sekcion de ISAE.

Kion vi konsilas?

La kolumnoj de nia Novaĵletero estas malfermaj al niaj membroj esprimi proprajn pensojn.

Rotterdam,
1984-12-22.

Limdato por la proks. Novaĵletero
15-a de februaro, en Roterdamo.

Interŝanĝo de ideoj.

Jam je alia paĝo ni menciis la aranĝon, ke la unua renkontiĝo de la Fakgrupo okazos en la kadro de la 19-a Markola Kongreso, en Belgio meze de aprilo. S-ro Rotsaert aciigis nin, ke jam venis tiom da aliĝoj, ke komencas esti problemo rezervi ĉambrojn en apudkongresejaj hoteloj, kvankam rezervi ĉambrojn en bonaj hoteloj ne estas, en si mem, malfacile.

Se vi havas la ideon eble partopreni tiun tri-landan kongreson en ĉarma, interesoplena urbo kiu konservas mezepokan etoson, nepre baldaŭ peti informojn.

Oni promesas distroplenan programon, en kiu unu ero havos apartan intereson por niaj membroj. Tiu ero estos 'faka' ekskurso al la konstruata haveno de la apuda havenurbo, Zeebrugge, (zibruga), sed okazigo de tiu ekskurso dependas je sinanonco de ninimuma 'publiko'.

El alia letero, tiu de D-ro Gether, ni konstatas, ke eble la plej unua renkontiĝo inter membroj de nia Fakgrupo jam okazis!

D-ro Gether faris, fine de novembro kaj komence de decembro, prelegvojaĝon en Francio, kaj unu loko sur la programo estas la urbo Bar-le-Duc, en kiu loĝas S-ro Gilbert. Espereble, ni aperigos raporton de D-ro Gether pri la prelegvojaĝo, kaj pri la spertoj de aktiva ekonomia studrondo en Budapeŝto.

De tiu nia membro en Francio, S-ro Gilbert, venis pli da detaloj pri la proponata plurlanda asocio por ekspluati la kulturan riĉecon kaj turismajn allogaĵojn de la baseno de la rivero Meŭz.

Venis, efektive, fotokopio de

la Statuto de unu el la naciaj asocioj, el kiuj, eble, oni formas la plurlandan asocion. Sekve de peto de S-ro Gilbert, ni faris tradukon de la Statuto. Tiu traduko, en la formo de dek-du-paĝa broŝuro, estas havebla ĉe ni, kontraŭ (antaŭ) pago de kvin guldenoj, (inkluzive de sendokostoj), sed kun rabato de unu triono por mendoj de tri aŭ pli da tri ekzempleroj.

La Statuto mem povas esti interesa en si mem por kelkaj niaj membroj, ĉar ĝi estas bona ekzemplo de la klasika stilo de nederlandaj advokatoj por tia bonfara asocio. Estus aparte interesa por la subskribanto legi komentojn pri la kvalito de la traduko!

S-ro Gilbert sendis por nia biblioteko informfoliojn pri la regiono de la komerca ĉambro por kiu li estas direktoro. Sendube li pretas sendi ekzemplerojn ankaŭ al vi, se vi tion petas.

(Sed ne forgesu la ĝentilecon sendi al li respondkuponojn por la afranko, ni petas!)

De S-ro L. Gilperez, en Hispanio, (direktoro de la Instituto Dex, kiu estas membro de nia Fakgrupo), venis diskutindaj ideoj. Inter ili la ĉefa estas konsilo, ke ni starigu formalan kategorion de membreco por entreprenoj, kaj ke tia membreco donus la rajton al la entrepreno, (rajto, kiun ni instigu ilin uzi), inkluzivi en siaj presitaĵoj, (leterpaperoj, kovertoj aŭ simile), frapfrazon kiel: Membro de IKEF -- aŭ simile, se ni adoptos alian nomon. Krome, ke ni desegnu taŭgan insignon kiu povus esti uzata ankaŭ sur prospketo, informiloj,

pago ok

instrukciiloj kaj eĉ varpakajoj de la entrepreno, kun la uzado de la i.l. kune kun aliaj lingvoj.

Desegnadtalento por la insigno, S-ro Gilperez konfesas, mankas ĉe li!

Kun S-rino Luin ni interŝanĝis la unuajn pensojn pri ekonomiaj raportoj bazitaj sur oficialaj statistikaj donitaĵoj, haveblaj en la diversaj landoj, sed la afero restas sur tre malalta nivelo de, efektive, simpla mencio de la diversaj statistikoj pri nombro de enloĝantoj, valoroj de nacia produkto kaj eksterlanda komerco, kaj tiel plu. Bezonata estas membro kun spertoj en la kunmeto de tiaj raportoj, kaj kiu estas preta surprenzi la taskon de kunordiganto. Ĉu ni havas sinproponon?

De pluraj membroj ni ricevis

tre bele afrankitajn kovertojn, evidente intence tiel faritajn.

Nome de la Fakgrupo, ni esprimas varmajn dankojn.

Ne nur pro tiuj kovertoj, sed ankaŭ pro multaj aliaj kovertoj ricevitaj dum la lastaj jaroj, ni efektive nun disponas pri riĉa, (kvankam tute ne ordigita!), kolekto de poŝtmarkoj. Ĉu iu membro pretas proponi malavaran donacon al la Fakgrupo por ricevi la kolekton? Aŭ ĉu tiu aŭ alia membro pretus daŭre ricevi poŝtmarkojn, kaj ilin 'konverti' en monon por esti enspezo por la Fakgrupo?

Notu kiel facile estas, proponi taskojn por volontuloj!

Kaj nepre memoru, ke al la mondo pli valoras niaj atingoj ol niaj aspiroj!

lm

Diversaĵoj.

Pri pagoj al ni.

Por 1985, la membro-kotizo restas je dudek guldenoj. Prefere faru pagon aŭ rekte tra la poŝtĉekinstancoj, (se vi disponas pri poŝtĉekkonto), aŭ per internacia poŝtmandato. En ambaŭ kazoj, uzu simple la adreson:

Mondk. Eldonejo Esperantista,
P.O. Kesto 25041,
3001 HA Rotterdam, Nederl.,

kaj per noto sur via pagilo indiku: por la fakgrupo komerca. Por pagoj tra la poŝtĉekinstanco, uzu kontonumeron 361 47 95 kiu estas la pĉk. de M.E.E. en Nederlando. Nur en kazoj, kiam ne eblas uzi la poŝtĉekinstancon, vi rajtas sendi ordinaran bankĉekon aŭ fari bankan transpagon, sed tiam al mi persone, ĉar M.E.E. ne tenas bankrilaton. Sed nepre tiam memori la tre altajn kostojn, (7,50 gld.), postulatajn por transpagoj de malgrandaj sumoj tra la bankoj.

Ni memorigas, ke vi ĉiam rajtas fari anticipan pagon de via kotizo por la proksima jaro aŭ kelkaj proksimaj jaroj, por ŝpari al vi problemojn kaj faciligi por ni financajn zorgojn.

Se, pro iu kaŭzo, ne eblas al vi fari transpagon, nepre tamen sciigu nin pri via intenco resti membro, kvankam necesas emfazi, ke ni ne povas garantii solvon.

Radio-elsendoj en Esperanto.

Fidela laboro, plenumata regule por nia komuna celo, estas tio de la kompilado kaj elsendo per radio de instigaj paroladoj, novaĵleteroj kaj respondoj al informpetantoj, sen ia penso pri materia gajno en ia formo. Tiu laboro plene meritas nian aktivan subtenon!

Kvar el tiaj elsendoj estas facile kapteblaj en Eŭropo, kiel ni povas atesti pro personaj spertoj. Ni volas instigi al niaj membroj subteni tiujn elsendojn, per salutkartoj aŭ pli longaj mesaĝoj.

Plenaj adresoj de Radio Vieno, Radio Roma, Radio Pekino kaj Radio Polonia, kune kun aliaj adresoj, estas troveblaj en la Jarlibro de UEA kaj aliloke.

Subtenu amase tiun ĉi agadon!

Ek al prosperplena Nova Jaro !!